La muziko de la sekvantaj kantoj, jam de longe kantataj ĉe la grupo de Sidnejo, estas havebla ĉe "La Suda Kruco" (Box 1367, Elizabeth-str: P.O., Melbourne) por 4 poŝtmarkoj (8 pencoj). Kantu ilin en via grupo!

### Piknika Invito.

Ho, venu, amikoj, al nia pikniko,
por ĝui ĝojecon kun gaja anar'!
Bonvenu al nia kampfesta kunveno. . .
Ho, venu al verda kaj bela kampar'
kun ni! Kun ni!
Ni iros al verda kaj bela kampar'.

Ho, inter la floroj, en freŝa aero,
ni dancos kaj kantos per dolĉa kantar';
ni ridos, parolos la lingvon de l' koro. . .
ni amos en verda kaj bela arbar'
kun vi! Kun vi!
Ni amos en verda kaj bela arbar'.

### Kantu Esperante.

Nune kantu Esperante,
kantu kun la tuta mond'.
Supren levu voĉojn laŭte
en feliĉa, viva rond'.
Diru al homaro tuta:
Gekunuloj estas ni.
Kantu per la lingvo bela,
ke gefratoj estas ni.

### Amatino Mia.

Kiam ŝin mi vidas,
tiam el la kor'
gaje mi kantadas. . .
kantas al la flor'.

Rekanto:
Belulino mia,
koro de anĝel',
karulino dolĉa . . .
mia rava stel'!

Kiam ŝi ridetas,
dancas mia kor';
gaje mi kantadas
vortojn de ador'.

Kiam ŝi benegos
per la blanka man',
tiam mi kantados:
"Estas mi amant'."
—Vortoj de T. Caffrey, F.B.E.A.

## Ne Estas Felic'o.

El memorskriboj de komercvojaĝisto.
De Ŝulojm Alejĥam.

— Vi parolas pri ŝtelistoj? — diris eleganta sinjoro kun valizo en la mano, kiun li gardis, kiel la pupilon de l' okulo.

(Tio estis nokte en stacidomo de dua klaso; ni sidis triope kaj atendis la kuriervagonaron, kiu malfruiĝis je unu horo kaj kvarono, kaj paroladis pri ŝtelistoj kaj ŝteloj).

— Pri ŝtelistoj vi parolas? pri ŝtelistoj? — lasu min; kie vi vidis tiom da ŝteloj, kiom en nia negoco? Ĉu briliantoj estas malgravaĵo? La pasio al briliantoj estas ja tiel granda, ke eĉ inter la aĉetantoj troviĝas ŝtelistoj; kaj ankoraŭ ne tiom inter la aĉetantoj, kiom inter la aĉetantinoj — inter la sinjorinoj. Ni rigardas ĉiun sinjorinon, kiun ni ne konas, per sepdek sep okuloj. Ne tiel facile oni povas ŝteli ĉe juvelisto lian komercaĵon; mi povas fanfaroni, ke, de kiam mi estas komercisto kaj komercisto en briliantoj, oni min ankoraŭ neniam priŝtelis. Mi mem tute ne estas juvelisto, t. e. juvelisto mi estas, sed mi ne okupas min je juvelmetio; mi estas nur komercisto, kiu komercas je briliantoj. Mi aĉetas kaj vendadas briliantojn, plejmulte mi vendadas en la lokoj, kiuj estas proksimaj de mia naskiĝurbo kaj malplejmulte en fremdaj lokoj; dum la foiroj, aŭ tiam, kiam troviĝas ie aĉetanto, mi prenas mian valizon, ĉi tiun, en la manon, sidiĝas en vagonaron kaj veturas. Foje okazis, mi ekscias, ke en urbo Jupec estas riĉulo kaj li edzinigas filinon: eble li bezonas briliantojn. Sed ankaŭ, se ni parolas alifianke, en Jupec troviĝas ankaŭ sufiĉe da juvelistoj, eble pli multe, ol oni bezonas, sed unu al alia ne koncernas. Eĉ se estus okdek mil juvelistoj, vi nur donu al mi aĉetanton, mi jam montros, kiu profitos — mi aŭ ili. Vendi briliantojn estas ruza afero, kiun oni devas scipovi; oni devas scii, kion montri, kiel kaj al kiu montri. Mi ne devas kaj ne volas antaŭ vi fanfaroni, ĉar mi tute malamas la fanfaronadon, sed, kiam vi parolos pri mi kun juvelistoj, ili ĉiuj diros al vi, ke konkuri kun mi ne estas facile: tie, kie alia enspezos centon, mi enspezos tri centojn. Mi scipovas la aferon.

Unuvorte, mi veturas Jupec'on. Mi kunprenis, imagu al vi, multe da komercaĵoj (ni ĉiuj havu, kiel propraĵon, tiom, kiom ili valoris, kvankam ili enlokiĝis en ĉi tiu valizo), kaj mi sidiĝis kaj sidas. Kompreneble, mi sidas bone apogiĝinte sur mia valizo, mi ne foriras de mia loko. Pri dormo mi eĉ ne parolos: kiam oni veturas kun komercaĵo, oni ne dormas. Kun ĉiu nova persono, kiu eniras la vagonon, deŝiriĝas io en mia koro: eble li estas ŝtelisto? Sur nenies nazo ja estas skribite. . . .

Dio helpis, post tagnokta veturado, ne manĝinte, ne trinkinte, mi alveturis Jupec'on al la riĉulo, eligis mian komercaĵon, parolis, paroladis, kaj, kiel ordinare, enspezis. . . malsanon, ne monon.

La riĉuloj (mi ne volas malbonparoli pri ili, sed venu je ili bona ĥolero) marĉandas, marĉandegas, rigardadas, tuŝegas ĉiun objekton kaj fine — ili nenion aĉetas. Sed kion oni povas fari? Ĉu mi enspezis, ĉu ne, mi devas kuri pluen; mi kaptas droŝkon kaj rapide veturas al la stacidomo. Dume mi aŭdas, iu malantaŭ mi krias: "Sinjoro, sinjoro." Mi rigardas reen — juna sinjoro kuras al mi kaj tenas valizon en la mano, ĝuste tian, kiel mia, kriante:

— Jen, vi perdis. . . .

Malfeliĉo, sortbato! Ĉi tiu ja estas mia valizo. Kie? Kiam? Kiel? Estis destinite: ĝi elglitis el mia mano kaj tiu juna sinjoro ĝin levis. Mi alkuras al mia juna sinjoro, premas lian manon, dankegas lin:

"Dankon al vi, Dio donu al vi sanon kaj feliĉon; dankon," mi diras, "kaj ankoraŭ dankon." Li respondas al mi: "Ne estas pro kio danki." Mi diras: "Kial vi diras, ke ne estas pro kio? Vi ja savis al mi la vivon, vi ja faris tian bonfarajon, ke ĉi tiu mondo kune kun la ĉiela regno malmulte estas por vin rekompenci. Diru al mi, kiom doni al vi, diru, ne hontu.' Mi jam volis elpreni la monujon el mia poŝo, sed li diris: "Se vi mem diras, ke ĉi tio estas gravega bonfaraĵo, do, kial mi devas ĝin vendi

por mono?" Kiam mi aŭdis tion, mi ĉirkaŭprenis lin kaj komencis kisi.

"Dio mem," mi diras, "rekompencu vin pro tio, kion vi faris al mi. Tamen ni eniru kaj malsekigu niajn buŝojn per glaseto da vino."

"Glaseto da vino," li diras, "kial ne?"

Ni sidiĝis ambaŭ en la droŝkon kaj mi jam forgesis pri la stacidomo. Ni veturas kafejon por preni ion en la buŝon. Alveturinte kafejon, mi petis apartan kabineton kaj ordonis alporti diversajn bonaĵojn, kaj ni sidiĝis iomete por interparoli. Tiu juna sinjoro, krom tio, ke li, oni povas diri, savis al mi la vivon, simple plaĉis al mi: simpatia homo, kun simpatia vizaĝo, kun profundaj, seriozaj, nigraj okuloj, unuvorte — ora homo. Ankoraŭ li estas hontema — terure. Mi petis lin, ke li ne ĝenu sin kaj ordonu alporti, kion li deziras — la plej karajn bonaĵojn, kaj kiom li ordonis alporti, mi, kompreneble, ordonis alporti duoble plimulte; mi bone eldrinketis, bone almanĝis, kiel Dio ordonis. Mi ne trinkis ĝis ebriiĝo, ĉar la hebreoj ne estas ebriemuloj, sed kiam mi fariĝis malkaŝema pro la vino, mi diris al mia juna sinjoro:

"Ĉu vi scias, kion vi faris al mi? Tio, ke vi savis al mi tian multekostan riĉaĵon, pri tio mi ne parolos. Ni ambaŭ tiom havu, kiel propraĵon, kiom mi ŝuldas je ĉi tiu komercaĵo, ĉar ĝi estas Dia kaj fremda. Vi simple savis al mi la honoron kaj la vivon, ĉar miaj kreditoroj, se mi venus hejmen sen ĉi tiu valizo, certe opinius, ke tio estas ruzartifiko, kiun uzas niaj juvelistoj tre ofte: ili forvendadas sian komercaĵon kaj disvastigas famon, ke ili estas priŝtelitaj. Mi estus devigata, ĉu vi aŭdas? nur aĉeti ŝnureton kaj pendigi min sur la unuan renkontotan de mi arbon. Mi trinkas por via vivo kaj sano; Dio feliĉigu vin, kiel vi mem deziras al vi kaj estu sana; ni kisu nin, ĉar mi devas jam veturi."

Mi kvitiĝis en la kafejo kaj mi rememoris pri mia valizo — kie estas la valizo? la juna sinjoro? ne estas. Mi svenis.

Kiam mi svenis, oni min vekis. Kiam mi vekiĝis, mi ankoraŭ svenis kaj kiam mi la duan fojon vekiĝis, nur tiam mi ekkriis, levis la tutan policon de Jupec je la piedoj, promesis bonan rekompencon, kuris kun ili en ĉiujn "bonajn" lokojn, estis kun ili en ĉiuj suspektindaj lokoj, konatiĝis kun ĉiuj mondŝtelistoj — mia juna sinjoro tute malaperis. Mi tute malfortiĝis, fariĝis abomena por mi la mondo. Mi enlitiĝis en mia gastejo kaj pensas, kiel fini mian vivon. Ĉu mortigi min per tranĉilo? Ĉu pendigi min per ŝnuro? Ĉu jeti min en riveron? Dume mi kuŝas enprofundiĝinte en malgajajn pensojn, mi aŭdas, — oni frapas. Kiu estas? — oni venis min preni policejon: oni kaptis la ŝteliston kun la valizo, kun la tuta komercaĵo. Ĉu mi devas rakonti al vi, kia mi fariĝis, kiam mi ekvidis mian valizon kun la briliantoj? Mi ankoraŭ unu fojon svenis: mi havas kutimon de svenado. Kiam mi vekiĝis, mi aliris al mia juna sinjoro kaj diris al li:

"Mi ne komprenas, klarigu al mi; mi preskaŭ freneziĝas. Kia enigmo ĝi estas; kiam vi trovis mian valizon, vi postkuris min, redonis ĝin al mi kaj eĉ ne volis preni por la bonfaraĵo pagon; sed kiam mi nur deturniĝis je momento, vi iras kaj ŝtelas mian tutan havaĵon — mian animon? Vi ja min preskaŭ malfeliĉigis. Ja mankis al mi nur unu minuto al la morto." Rigardas min la juna sinjoro kun profundaj, seriozaj, nigraj okuloj kaj respondas al mi tute trankvile:

"Kio koncernas unu al alia? Bonfaraĵo estas bonfaraĵo kaj ŝteli — tio estas," li diras, "mia okupiĝo. . . ."

"Sinjoro," mi diras al li, "kiu vi estas?"

"Kiu," diras li, "mi devas esti? Mi estas bedaŭrinde, ŝtelisto, patro de multaj infanoj kaj granda malfeliĉulo. Mi havas, oni ne malbonokulu, bonan okupiĝon, sed mankas al mia okupiĝo — la feliĉo. Mi ne devas plendi, dank' al Dio, ŝteli — ŝteliĝas facile, sed la manko estas, ke ne ĉiam sukcesas al mi. Ne estas feliĉo. . . ."

Kiam mi jam sidis en vagono, mi konsciis, ke mi havas ĉevalkapon: per bagatelo mi povus tiam liberigi tiun ŝteliston. Kial mi bezonis fariĝi pereiganto de homo? Li povus ja enfali en aliajn manojn. . . Eble vi estos aĉetanto de du briliantaj orelringoj je meza prezo ? Mi montros

al vi ion; vi tiajn briliantojn ne vidis eĉ en sonĝo. La plej bona speco. . . .

El la hebrea lingvo tradukis
M. Ŝaĥnoveckij.

---

## En Kaptilo.

Rakonto de Sidor Kocma.

Laŭ profesio, mi estas arĥitekturisto. Antaŭ kelkaj tagoj unu el miaj amikoj, kuracisto-psikiatro, skribis al mi la jenan leteron:

"Kara amiko! En mia malsanulejo, dank' al Dio, estas tia amaso da pacientoj, ke mi ne scias, kien ilin loki, kaj tial, mi estas devigita pligrandigi la konstruaĵon. Bonvolu viziti min en unu el la plej proksimaj tagoj; venu al tagmanĝo, por ke ni povu libere priparoli, kiel kaj kion konstrui. Ĝis la revido. Via fidela, k. t. p.. . . ."

Post tri tagoj mi sonoris ĉe bela, ornamita villo, kie loĝis mia amiko; ĝi estis apartigita de malgaja konstruaĵo de psikiatria malsanulejo per ombroplena ĝardeno.

Ĝis la tagmanĝo ni esploris la lokon kaj pririgardis de ekstere la pligrandigotan konstruaĵon. Poste ni revenis en allogan loĝejon de la doktoro, kie nin atendis la gastama mastrino kun bonega tagmanĝo. La pladoj kaj boteloj estis rapide malplenigitaj kaj la interparolado fariĝis ĉiam pli viveca.

La profesio de mia amiko vekis en mi grandan intereson; li lerte elektis el sia praktiko tion, kio estis komprenebla al simpla mortemulo. En la interparolado, li ankaŭ ektuŝis la demandon pri tio, kiel malfacile estas altiri la frenezulon en la malsanulejon kaj kiom da ruzeco en tiaj okazoj estas necesa al kuracisto.

— La plimulto de malsanuloj teruriĝas ĉe la penso, ke ili iros en la malsanulejon, — diris mia amiko, — uzadi la perforton estas tre malutile, ofte eĉ danĝere, kaj tial la kuracisto devas elpensi milojn da ruzaĵoj por venigi malsanulon en tiun ĉi malgajan institucion, kie li estos ĉirkaŭita per speciala kaj taŭga flegado. Tamen, plena resaniĝo okazas tre malofte. Unu dentiston, malsaniĝintan je danĝera psika animkonfuziĝo, oni neniel sukcesis venigi ĉi tien; tiam, mi invitis lin al unu mia paciento, malsana je dentdoloro. Tute ne protestante, li kunmetis siajn ilojn kaj forveturis kun mi. Mia ruz[...] bonege sukcesis. La malsanaj[...] advokatojn mi invitas sub preteks[...] de grava proceso, kiun mi kvaza[...] deziras komisii al ili; la pastroj[...] mi petas komunii la mortantan mal[...] sanulon. . . .

"Diablo prenu, — mi pensis, du[...] la doktoro estis konfidanta al m[...] siajn strategiajn metodojn, — ka[...] la arĥitekturistojn li verŝajne invita[...] sub preteksto de konstruadoj? . . ."

Mi ektuŝis per la mano la kapo[...] kaj trankviliĝis, pensante, ke m[...] estas tute normala kaj efektiv[...] invitita por konstruado.

— Vi ne povas imagi al vi, — daŭrigis mia amiko, — ĝis kia grad[...] tiuj ĉi malfeliĉuloj estas certaj pr[...] sia plena sano kaj normaleco; ili [...] ne suspektas sian staton.

Al mi fariĝis iel strange. Ki[...] okazos, se mi ankaŭ estas en simil[...] stato?

— Antaŭ nelonge, — daŭrigis la doktoro sian rakontadon, — mi havi[...] la aferon kun juna aristokrato. L[...] estis neniel trompebla. Fine mi de[...] cidis inviti lin al tagmanĝo. Li veni[...] kaj sidis ĝuste sur la sama loko, kie vi sidas nun. Post la tagmanĝo, mi proponis al la juna homo rigardi la malsanulejon kaj montris la izolitajn ĉambrojn. En unu el ili, mol[...] drapirita, mi rapide fermis la pordon kaj tiamaniere kaptis lin.

Kun maltrankvileco mi ekmoviĝis sur la seĝo, sur kiu, kiel mi ĵus estis aŭdinta, ankoraŭ sidis antaŭ nelonge la frenezulo. Povas esti, ke ankaŭ hodiaŭ ripetiĝos la samo. Sed mi rapide forpelis de mi tiujn malsaĝajn dubojn. Neniu el miaj antaŭuloj suferis la animkonfuziĝajn malsanojn, kaj tiuj ĉi estas ordinare heredeblaj. Ne, ne, tiu ĉi invito ne estis preteksto, por mni altiri, oni efektive bezonas min, kiel arĥitekturiston.

*
* *

Post la tagmanĝo, la doktoro proponis al mi rigardi la malsanulejon; ĝi min tre interesis kaj, ĉar mi hontis eĉ ŝerce esprimi mian timon, mi tuj konsentis.

Ni iris en la malsanulejon, vidis ĉirkaŭ kvindek ĉambrojn kaj ĉirkaŭ cent kvindek malsanulojn. Ne eĉ en unu ĉambro, dank' al Dio, oni min ŝlosis, ĉar mi atentis je tio, ke la

doktoro estu ĉiam je kelkaj paŝoj antaŭ mi.

Fine ni eliris el la konstruaĵo de malsanulejo. Kiam mi transpaŝis ĝian sojlon kaj ekspiris freŝan aeron, min ekregis feliĉa konscio, ke mi estas psike sana.

Ni ne estis ankoraŭ foririntaj kelkajn paŝojn, kiam mi rimarkis, ke en unu el la ĉambroj mi forgesis mian novan silkan pluvŝirmilon. — Mi eĉ rememoris, en kiu ĉambro mi ĝin lasis, kaj mi diris al la amiko, ke mi devas reveni.

— Bone, bonè, iru, la servistoj helpos vin trovi la pluvŝirmilon, — diris la doktoro, kaj mi ekkuris sur ŝtuparo, transsaltante po kelkaj ŝtupoj.

El supro mire rigardis min unu servisto.

— Akompanu tiun ĉi sinjoron, — ekkriis al li la doktoro, montrante min.

La servema malsanulisto tuj iris post mi, montrante al mi, kun ia stranga afableco, la vojon.

— Ĉi tien, ĉi tien, bona sinjoro, pli maldekstren. . . jen tien!

Mi haltis por pli bone vidi tiun ĉi strangulon.

— Iru do antaŭen, mia karulo, — mi diris al li, — kaj serĉu mian pluvŝirmilon.

— Certe, certe, ni serĉos la pluvŝirmilon, kara sinjoro. Mi iros antaŭe. . . kaj vi iru post mi.

Mi rimarkis, ke la servisto faris ian signon al sia kolego.

La unua servisto ekiris antaŭe, kaj la dua, kiun li alvokis, — malantaŭe.

Mi haltis.

— Vi, ŝajne, imagas al vi, ke mi estas frenezulo? Mi faros ne eĉ unu paŝon antaŭen. Serĉu mem mian pluvŝirmilon, aŭ diablo ĝin prenu!

Dirinte ĉi tiujn vortojn, mi turniĝis por reveni al la amiko kaj plendi je la malsaĝaj servistoj; sed en la sama momento mi eksentis, ke oni min kaptis kaj renversis sur la plankon.

— Malkvietulo! — ekkriis ambaŭ servistoj, kaj ankoraŭ kelke da homoj ekrapidis por helpi ilin.

Mi penis forliberigi min, kriis, piedbatis kaj ungogratis ilin, sed vane. Ses servistoj levis min, kiel pilkon, kaj forportis en la mole drapiritan ĉambron. La ŝlosilo dufoje turniĝis en la seruro kaj mi restis sola en la ĉambro por malkvietaj malsanuloj.

Mia malespero estis senlima. Ĉu efektive mi estas frenezulo? Mi komencis rememori la plej bagatelajn detalojn de mia vivado dum lasta tempo. Sed, malgraŭ ĉiuj miaj penoj, nenion suspektan mi povis ekrememori. Ne, milfoje ne, mi ne estas frenezulo!

Sed, se mi estas sana, kial do mia amiko ne venas al mi? Li certe rimarkis, ke mi jam de longe ne revenas.

En la pordo de la ĉambro estis malgranda truo, tra kiu min senĉese observis ies okuloj; evidente oni gardis, ke mi ne faru al mi ian malutilon.

Fine la pordo malfermiĝis, eniris ia tre ĝentila juna kuracisto kaj afable petis, ke mi pruntu al li mian poŝan tranĉilon.

Tio estis terura impertinenteco! Ili opiniis, ke mi estas min vundonta! Mi komencis konsideri. Se mi ne donos la tranĉilon, ili opinios min tre malsana kaj eble forprenos ĝin perforte. Pripensinte, mi malestime ĵetis la tranĉilon al la piedoj de la kuracisto.

—Trankviliĝu, — li diris paceme, — mi donos al vi ian trankviligan kuracilon.

— Prenu ĝin kaj manĝu mem kaj por mi venigu la ĉefan kuraciston, al kiu mi estas veninta ĉi tien, kiel gasto.

—Certe, certe, vi estas nia gasto! Trankviliĝu, mi petas; tio estas la plej bona por vi. La direktoro ne povas tuj veni al vi; lin oni invitis al unu mortanto. Sed li certe vizitos vin, kiam li revenos.

Mi restis du horojn malliberigita.

Fine, post la pordo mi ekaŭdis laŭtan ridon, interrompitan de insultado; evidente mia amiko rapidis kun helpo. Li insultis la servistojn, sed li ne povis deteni sin de rido.

Larmoj de rido aperis en liaj okuloj, kiam li estis malferminta la pordon kaj ĉirkaŭpreninta min je kolo, kun senfinaj petoj pri pardono.

— Mi volonte pardonas vin, — mi diris malvarme, — vi ja ne estas kulpa, sed nun, mi petas, ellasu min, kiel eble plej baldaŭ.

Per rapidaj paŝoj mi malsu-

preniris, ne demandinte eĉ pri mia pluvŝirmilo kaj tranĉilo.

Mia amiko, petante pri pardono, kuris post mi.

— Diru, mi petas, kiam vi venos fari kontrakton rilate al la konstruado? — li demandis.

— Neniam!

Plu mi ne povis vidi tiun domon.

Esperantigis
Karolo Nievenglovski.

---

## "The Esperanto Guide."

### Translation of the Exercises.

**Exercise 12.**—La homo havas nur unu nazon kaj unu buŝon, sed li havas du orelojn kaj du okulojn. Hodiaŭ mi ricevis nur tri leterojn. Ĉar vi ambaŭ estas miaj amikoj, mi diras al vi ĉion. Ŝi povas fari ĉion per siaj du manoj. Kvin homoj povas pli bone fari, ol kvar. Li promenas en la nokto kun siaj sep hundoj. Estas ses infanoj en mia ĉambro. Sep kaj naŭ faras dek ses. Unu horo konsistas el sesdek minutoj, kaj estas sesdek sekundoj en unu minuto. Kio estis sur la tablo? Kion vi trovis? Mi trovis dudek du, kaj ne dudek kvar, pomojn sur la tablo. En unu jaro estas dek du monatoj. Kion vi faris? Mi promenis kun mia avo. Dio kreis la homon en la sesa tago de la semajno. Kiun daton estis naskita Georgo Vaŝington? Kiun filinon li vidis? Kiu filino vidis lin? Unu el la amikoj de via patro estas en la domo.

**Exercise 13.**—Oni amas ordinare personon, kiu estas simila al li. Tial la vidvo, pri kiu mi parolis al vi, varmege amas sian pli maljunan (or: pli aĝan) filon, kiu estas tiel fiera kaj obstina. Sed li havas nur teruran malamon kontraŭ la pli juna. Oni rakontas inter aliaj aferoj, ke ĉi tiu malbona homo nutras lin per pano kaj akvo. La malfeliĉa knabo devas manĝi en la kuirejo. Li ofte batas lin kaj devigas lin porti grandan kruĉon al malproksima loko kaj alporti ĝin domen plenan de akvo. Varmega; sanktega; kruĉego; kuirejo; paperejo; vinejo; kuiradi; portadi; pensado; varmigi; sanktigi; plenigi; unuigi; ĝojigi.

**Exercise 30.**—Vi ne devas fari tion iel, sed kun multe da zorgo. Mi trovis ion, sed mi ne volas montri ĝin al vi. Donu al mi iom da akvo. Mi metis mian libron ien, sed mi povas retrovi ĝin. Se ial vi pens ke mi devas fari tion, mi faros ĝ Se vi iam bezonos helpon, venu al Iu venis viziti mian patron hie matene. Ĉi tiu libro certe estas Vi trovos vian leteron en iu lib Ŝia teruro estis tia, ke ŝi ne po paroli. Kian ĉambron vi havas la hotelo? Kiajn plumojn vi dezi havi? Nenia antaŭa sperto es necesa. Li ne povis diri, kie, ki kaj kiel li vidis vin. Kies estas tiu tranĉilo? Nenies. Diru al kial vi faras tion. Kiom da hom estas pli obstinaj, ol muloj! bruo! Ĉiu afero havas sian bon kaj sian malbonan flankon. Ĉie, vi haltos, vi trovos akvon. Ne skri tiel rapide. Ne skribu tiel. kredas ĉion, kion ili diras al ŝi. atakis nin ĉiel. Ĉiu saĝa homo laŭdos. Ĉiuj saĝaj homoj vin laŭd Ĉiu demandis lin, kial li faris ti Iam, kiam mi havos plumon en (or: la) mano, mi respondos li leteron. Ĉiam, kiam (or: ĉiufo kiam; or: kiam ajn) mi vidas lin, laboras. Tuj, kiam mi diris ĝin al li foriris. Mi deziras loĝi ie, kie es kviete. Kiel bona li estas! Mi povas iel kompreni ĝin. Ĉu vi aŭd tion, kion (or: Ĉu vi aŭdas, kion) diras? Tio, kio (or: Kio) estas s la tablo, estas tre bona. Mi vid tion, kio estas sur la tablo. Ti kion vi perdis, estas sur la tablo. komprenas iom. Kiom ĝi kosti Ĉu vi povas memori tiom? Kiom sukero ŝi prenas? Neniom. Li hav tiom da vino, kiom da akvo. neniu estas tie? Mi vidis iun, ki mi konis. Kiuj estas viaj libroj?

**Exercise 31.**—Mi ne miras pri t kion vi diras, ĉar li ĉiam estis t kuraĝa. Mi ne kuraĝas iri tien. ĉiam agis kuraĝe; lia kuraĝo est mirinda. Kial vi ĉiam parol kolere al li? Li koleras vin, ĉar ne volas obei lin. Respondu skri kaj ne parole; tio estos pli bon Ili metis la senvivan korpon sur liton kaj kuris al la malfeliĉa pat de la mortinto. Ni ĉiuj loĝas ekst la vilaĝo. La ekstero de ĉi tiu dom estas tre bona, sed la interno estas tre agrabla. La ekstera kov (or: kovrilo) de la libro ne est pura. Kial vi alvenas tiel malfru hodiaŭ? Ĉar ni iris al niaj amik kaj trarigardis ilian novan domo

Ni vidis la manĝoĉambron, la dormoĉambrojn, la salonon kaj ĉiujn aliajn ĉambrojn. Mi devas havi respondon, ĉu jesan aŭ nean respondon; mi ne povas atendi. La aglo deflugis de la kamentubo, kaj surflugis sur la tegmenton de nia domo. Johano defalis de tramo kaj rompis al si la dekstran brakon. Mi tralegis tiun libron. Ĉi tiu sinjoro havas grizajn harojn kaj nigrajn lipharojn.

(Next month: Exercises 14 and 32).

## Gazetoj Ricevitaj.

**"La Revuo Orienta,"** Tokio, Japanujo; n-roj 7, 8, 9 kaj 10. **"Le Monde Esperantiste,"** Paris; n-ro 5. **"Esperanto Triumfonta,"** Koln-Horrem, Germanujo; n-roj 5, 6 kaj 7. **"Espero Katolika,"** Vieno, Austrujo; n-roj 8-9 kaj 10. **"Franca Esperantisto,"** Paris; n-ro 5. **"Germana Esperantisto,"** Dresden; n-roj 2, 3-4, 5-6, kaj 8-9 (mankas n-roj 1 kaj 7). **"La Verda Ombro,"** Taihoku, Japanujo; n-ro 10. **"Nova Tempo"** (daŭrigo de estinta Viena gazeto "German - Austria Esperantisto"); n-roj 5, 6-7 kaj 9. **"Kristana Espero,"** Laihia, Finnlando; n-roj 2 kaj 3. **"Hungara Esperantisto,"** Szeged, Hungarujo; n-roj 9-10. **"Amerika Esperantisto,"** West Newton, Boston, Usono; n-ro 5. **"Argentina Esperantisto,"** Buenos Aires; n-roj 35 kaj 36. **"Esperanto Itala Revuo,"** Milano; n-roj 2, 3, 4, 5-6, 7-8 (mankas n-ro 1).

Ni volonte ricevus la mankantajn numerojn. Ni sendas nian gazeton pro interŝanĝo al ĉiuj Esperantistaj gazetoj.

En "Esperanto Itala Revuo" (n-ro 3) ni legas pri diverslanda progreso de nia lingvo sub titolo "Australia" la jenon: "Adozione dell' Esperanto nelle scuole primarie." Malfeliĉe tio ne estas fakto; Esperanto ankoraŭ ne estas instruata en la elementaj lernejoj ĉe ni. Tio estas nia celo; iam ĝi espereble estos realaĵo.

---

En "Amerika Esperantisto" ni legas en la raporto de la Haga kongreso, ke la filmo de la Tria Aŭstralia kongreso estis elmontrita al la kongresanoj, kun aliaj filmoj, ĉe speciala kinema.-prezentado.

## Vi Ne Kredu!

Vi ne kredu al mi, se en iu moment'
Pri fervora la am', pri pasia la sent'
Mi al vi flamrigarde parolas.

Mi mensogas al vi, ĉar ne amas mi vin —
En la tuta konfes' de komenco ĝis fin'
Mi nur ŝercas, babilas, petolas. . . .

Estas vere, ke mi ofte sur la vivvoj'
Eksopiras pri vi kun anima malĝoj',
Kun batado de l' koro sincera.

Kaj en tiu moment' ŝajne amas mi vin
Kaj forgesas, ke vi estas nur belulin' —
Malvarmema, sensenta, fiera.

Kaj en tiu moment' de la blinda korflam'
Mi parolas al vi pri la rev', pri la am',
Kaj mi mem kredas, kion mi diras.

Sed revenas konsci', rekomprenas mi vin,
Mi revidas, ke vi estas nur belulin' —
Sekve mi nur eraras, deliras. . . .

Do ne kredu al mi, se en iu moment',
Pri fervora la am', pri pasia la sent'
Mi al vi flamrigarde parolas.

Mi mensogas al vi, ĉar ne amas mi vin —
En la tuta konfes' de komenco ĝis fin'
Mi nur ŝercas, babilas, petolas. . . .

Vitold Jarmoloviĉ,
**Moskvo.**

---

## Seka Psalmo.

De I. S. Machar, unu el la plej ŝatataj el la moderna poetaro Ĉeĥoslovaka.

Problema estas nia karaktero.
Du strange dissonantaj tonoj, kiuj
en ĉiu paĝ' de nia historio
kaj de nacia vivo nia sonas:
nebulo Rusa, Franca ekscitemo.

Ĝi estas kvazaŭ sin amike premus
ĉe ni la manojn Franca okcidento
kun oriento Rusa reciproke
kaj en ni restus ambaŭ karakteroj.

Ni eksciteme kaj rapide brulas
por multa tute iluzia belo,
por multa, eĉ plej problemplena bono,
por multaj, ĵus naskitaj novaj celoj
(en kiu senco ni eĉ estas majstroj),
por vico da reformoj grandaj, brilaj.

Sed tuj de ie falas la nebulo,
subite nin rezignacio premas,

kaj restas nur maldolĉa elegio,
sopiroj plendaj, vangoj dolorplenaj.

Sed ree en nebulo eklumiĝas
kaj tuj ekĝojas, brilas kaj diboĉas
land' nia tuta. . . . . . . . .

Kaj ni tiel ĉiam
balancas de mallumo en la lumon.
Kaj tiel en ni ĉiam balancadas
la oriente-okcidentaj eroj,
de ambaŭ mankoj, sen iliaj fortoj.

Kaj tio estas fine plej malĝoja.

El la Bohema lingvo tradukis
doktoro Stanislav Schulhof.

---

## Esperanta Printempo.

La printempo ridetanta
reviviĝis sur la tero—
bela, hela, verdiĝanta,
tute plena de espero.
Via penso, malkredanto,
kun la tempo harmoniu!
Sonas eĉ la birda kanto
Esperante: "Tiu, ĉiu!"

Oresto Golovnin.

## El la Programo de Terkultura Ekspozicio.

11 h. La gastoj alvenas.
12 h. La bestaro alvenas.
1 h. Komuna tagmanĝo.

## Alta kaj Dolc'a.

La reklama arto progresas. Ĉe la "Nacia Varietea Teatro" en Balmain, apud Sidnejo, unu samideano, kiu tie aperas kiel trapezisto, prezentas sin kun la nomo kaj titolo "Esperanto, la fama kaj fulma trapeza artisto." Potenco al lia brako!

Melburna samideano, kiu havas kafejon sur unu ĉefa strato, nun vendas al siaj klientoj "La 'Esperanto' skatolo da sukeraĵoj." Sur la skatolo estas unu-du frazoj en Esperanto kaj Angla, kaj konsilo al demandantoj, kiuj deziras informojn pri la internacia lingvo, "iri al la librejo de Hutchinson kaj serĉu la homon kun la verda stelo." Dolĉo al lia sukero!

---

"The Esperanto won by two miles" ("La Esperanto gajnis per du mejloj") diris kabla depeŝo el Ameriko en niaj gazetoj antaŭ nelonge. Sed tiu Esperanto ne estis "simpla, fleksebla, belsona, vere internacia en siaj elementoj"; ĝi estis nomo de fiŝista ŝipo partopreninta la internacian veladon apud Halifax, Kanado.

---

Kun ĉi tiu numero ni dissendas "Alvokon por financa subteno de A.E.A."

**Libroj!** La Plej Lastaj.
**Libroj!** La Plej Bonaj.
Nova Provizo
J'us Ricevita.
Sendu 2 Pencojn por Listo al
"**Kookaburra"-Librejo,**
228 Bourke-Str:, Melbourne.

**Cole's Book Arcade, Melbourne.**
Two Million Books and Pieces of Music.
Send for "The Rainbow" Cole's Monthly about Books.
**Free to You.**

Printed for the Proprietors, The Esperanto Journal Committee, 87 Peel Street, Windsor, by Fraser & Morphet, Printers, Eastbourne St., Windsor.